


# SUDFRANCIJA STELO



\*\*\*\*\*  
Bulteno de la Esperanto-Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"  
Jarabono: 25 F al Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon  
CCP 956-28 P Montpellier N° 115 - 4a kvaronjaro 90 -  
\*\*\*\*\*

## AU BON TEMPS OU LA TAMISE SE JETAIT DANS LE RHIN

A nos amis Britanniques qui aiment à répéter «le Continent est isolé» lorsque le brouillard interdit tout trafic maritime ou aérien, on se doit de rappeler que jadis, la Tamise se jetait dans le Rhin. Il n'y a guère de cela que 150 millions d'années. Le channel devait subir ensuite une multitude d'états différents, avec la succession des glaciations. Cependant, l'Angleterre ne fut réellement coupée du Continent que vers 4000 avant Jésus-Christ, à l'occasion d'un violent orage qui emporta les dernières langues de terre.

Aujourd'hui, si l'on cherche à se représenter ce que serait le Pas-de-Calais sans eau, on aurait une vallée dont les pentes transversales seraient tellement douces, sur les deux versants, que l'œil en percevrait à peine l'inclinaison. C'est d'ailleurs cette caractéristique qui avait séduit les tenants d'un tunnel posé sur le fond de la mer, parmi lesquels, en 1894, Sir Edward Reed, membre du Parlement et ingénieur en chef de l'Armada. L'autre «avantage» de ce tube en était l'extrême vulnérabilité, permettant sa destruction lors de la moindre menace de conflit. Il faudra attendre 1955 pour voir les milieux militaires anglais retirer officiellement leurs objections à la création du lien fixe, puis quelques dizaines d'années supplémentaires pour que techniciens, financiers et politiques trouvent enfin un terrain d'entente. Mais savez-vous qu'avant la ratification officielle du traité, le 29 juillet 1987 à l'Élysée par Margaret Thatcher et François Mitterrand, sa gracieuse Majesté la Reine Elisabeth II avait dû cautionner l'accord par l'apposition de son sceau, surmonté, selon une tradition séculaire, de la phrase «LA REYNE LE VEULT...», en vieux français dans le texte! Ce lien est décidément bourré de symboles.

□ L.V. SKOGH  
Président-Directeur Général  
FLYGT FRANCE



## THE GOOD OLD DAYS WHEN THE THAMES FLOWED INTO THE RHINE

When fog cuts off sea and air traffic to the British Isles, the English comment aloofly, "The Continent is isolated". They should be reminded that their Thames River once flowed into the Rhine. That was just 150 million years ago. Then the English Channel underwent a series of changes due to successive glacial periods. Yet England did not cast off completely from the Continent until around 4,000 B.C. - when a fierce storm swept away the last ties of connecting land. What would the Strait of Dover look like today if unfilled with water? You would see a valley with such gentle side slopes that the valley would look practically flat to the naked eye. It was this characteristic that enticed the advocates of a tunnel to be laid on the Channel's bottom. Among them was Sir Edward Reed, Member of Parliament and the Admiralty's chief engineer in 1894. The other "advantage" claimed for a sea-floor tube would be its extreme vulnerability. The project's promoters stressed that a tunnel could be destroyed at the slightest threat of war. Yet it was not until 1955 that British military leaders officially withdrew their objections to building a fixed link with the Continent. It still took about three decades more for British and French engineers, financiers and politicians to agree on a precise project. Before Prime Minister Margaret Thatcher and French President François Mitterrand officially signed the tunnel treaty in Paris on July 28, 1987, Her Majesty Queen Elizabeth had to endorse the pact by stamping the document with her seal. Ironically, despite British military misgivings about that link to France, the seal was topped by the traditional phrase inherited from the Queen's French forebearers: "LA REYNE LE VEULT" (French for "It is the Queen's will"). This link is decidedly symbolic.

En tiu numero

Kotizoj, abonoj p.2/3  
Federacia kong. 4/5  
Vivo de la grupoj 6-9  
Historio de E'30 8  
En la gazetaro 10/11  
Filatelio, libro 12/13  
Distra paĝo p.14

## En la feliĉa tempo kiam Tamizo sin jetis en Rejnjon (ESPERANTO)

Al niaj Britaj amikoj kiuj ŝatas ripeti «la kontinento estas izolita», kiam nebulo nebligas ĉiun trafikon maran aŭ aeran, ni devas memorigi ke, antaŭlonge, Tamizo jetiĝis en Rejnjon. De tiam pasis nur 150 milionoj da jaroj kaj la Markolo poste suferis multegon da malsamaj statoj, inter kiuj la sinsekvon de glacitaj. Tamen, Anglio estis efektive dispartigita de la Kontinento nur ĉirkaŭ 4000 jaroj antaŭ Kristo, sekve de fortega fulmotondro kiu forportis la lastajn terlangojn. Hodiaŭ, se oni provas sin reprezenti kiel estus la Kaleza Markolo sen akvo, oni havis valon kun transversaj deklivoj tiom mildaj sur ambaŭ flankoj ke la kliniĝon okulo apenaŭ sensus. Cetere, tiu karakterizaĵo mem logis la proponantojn de tunelo rekte metota sur la marfundo, inter kiuj en 1894, Sir Edward REED, parlamentano kaj ĉefing-

niere de la Admiralejo. La alia «avantaĝo» de tiu tubo estis ĝia ega fragileco ebliganta ĝin detruiri kiam konflikto iomete minacas. Oni devis atendi ĝis la jaro 1955 por ke la Anglaj militaj medioj oficiale rezignu sian oponon al kreado de fiksa ligilo, kaj kelkajn pilajn dekojn da jaroj poste por ke teknikistoj, financistoj kaj politikuloj fine trovu akordan grundon. Sed ĉu vi scias, ke antaŭ la oficiala ratifo de la traktato, la 29an de julio 1987 en la Elizaea Palaco, fare de Margaret THATCHER kaj François MITTERRAND, ŝia gracia Moŝto, la Reĝino ELIZABETH II, devis garantii la akordon per surmeto de sia sigelo kun supre, laŭ jarcenta tradicio, la vortoj «LA REYNE LE VEULT» («La Reĝino tion volas») en malnova franclingvo. Tiu ligilo ja estas vere plena je simboloj.

Finiĝas jaro. La frontpaĝo simbolas gravan eventon de la finiĝanta jaro, kiu pliproksimigos la homojn de nia kontinento. Kompreneble estas ankaŭ malpli feliĉigaj eventoj; ni esperu, ke la lastatempaj minacoj forsvenos.

Grumblis lastfoje leganto, ke la raporto pri la kongreso de Kubo ne rilatas al nia federacio kaj ke la tiea ŝtatestro ne estas demokrato, ktp. Ni provas ĉiufoje prezenti agrablan frontpaĝon kun grava evento pri- kaj por-esperanta. SFS pretas aperigi la foton de iu ajn ŝtatestro aŭ gravulo, kiu deklaras: "mi konsideras min soldato de E°". Aprobo de politiko estas alia afero! Ni ankaŭ pretas aperigi artikolon kun fotoj pri loka agado. Ne trafis SFS multaj tiaj raporto...

Ne forgesu informi pri via klubo, grupo, pri viaj klopodoj aŭ projektoj... antaŭ la limdato. Denove malfruas SFS pro nerespekto de tiu simpla regulo. La tajpanto devis refari iujn tekstojn.

Por memori vin pri la datoj de niaj aranĝoj, ni aldonas kalendaron (p. 3), ne forĵetu ĝin. Aliĝu frue al la federacia kongreso (en Arles kun la Provenca federacio), al la staĝo de Béziers aŭ la semajnoj de Habère-Poche kaj Sète. Antaŭdankas la organizantoj.

Al ĉiuj feliĉan jaron 1991. Fartu bone!

J. Hénin.

\*\*\*\*\*  
 \*(Re)ABONO al SFS : La tarifo restas senŝanĝa. Sendu la sumon (25F) al la  
 \*\*\*\*\*  
 kasistino: S-ino Négron 40, Chemin des Amandiers  
 34400 Lunel  
 aŭ rekte al la pĉk 956-28P Montpellier : Fédération d'E° du Lang.-Rouss  
 Se vi estas membro de iu grupo, pagu kiel kutime al via kasist(in)o.  
 Anticipan dankon!  
 L'abonnement à SFS reste à 25F. Merci de le régler à notre trésorière  
 (adresse ci-dessus) ou directement à notre CCP ou plus simplement enco-  
 -re au trésorier de votre groupe.  
 \*\*\*\*\*

## KOTIZOJ

Jarfina refreno: sed por asocioj mono... estas bezono... por ĉies bono!

UEA: Universala Esperanto Asocio:

Membro kun jarlibro (kodo UMJ): 90F Membro kun jarlibro kaj la revuo "esperanto"(UMA): 225F

Membro kun gvidlibreto (UMG) : 40F Dumviva membro (UDM): 5625F

TEJO: Tutmonda E°-Junulara-Asocio (se vi estas malpli ol 30 jaraĝaj)

Membro (jarlibro+"kontakto"+Tutmondo"(MJK): 90F Membro: kiel maldekstre+"esperanto": MAK: 225F

Membroj de TEJO estas samtempe membroj de UEA

Personoj pli ol 30j. povas subteni TEJO-n kiel "patronoj"(TPM): 270F aŭ "bonfarantoj"(JPM): 100F

UFE: Union française pour l'espéranto

Aktiva membro (ricevas "Franca esperantisto"): FMA: 240F Paro: 370F (PK1+PK2)

Simpla membro: FSM: 100F Dumviva membro: FDM: 4800F

JEFO: (malpli ol 30j.) simpla membro: JSM: 100F Studento, senlaborulo (JMM): 65F

Membro aktiva de Jefe kaj UFE: (JMA): 240F

UFE (4 bis Rue de la Cerisaie 75004 Paris -Tel: (1)42 78 68 86) peras la kotizojn por

UEA/TEJO/UFE/JEFO. Ne sendu la kotizojn al la federacia kasistino!

\*\*\*\*\*  
SAT Amikaro: kotizo+abono: 140F Gejunuloj (ĝis 25j.): 70F

SAT: (Sennacieca Asocio Tutmonda): Kotizo: 215F (emeritoj: 160F; samfamilianoj, junuloj... 107F)

Sennacieca revuo: 40F Adreso de SAT: 67, Avenue Gambetta 75020 Paris. Tel: (1)47 97 87 05.

Praktikado... rimas kun legado. Kompreneble, unue abonu SFS, kies tarifo restas senŝanĝa (25F) kaj legu ĝin! Ĉe niaj najbaroj: "Provence E°"(40F), "E° Vaucluse"(15F), "Laŭte"(60F). Ankaŭ "E° 95"(dulingva): 6,2 Ekuoj, "E° Ile de France": 40F.

Ekzistas dekoj da revuoj. UEA peras kvindekonojn. Vi trovos ĉi-poste la tarifon de UEA en guldenoj. (1 Guldeno = 3FF). UFE ankaŭ peras diversajn abonojn sed ni ne ricevis la novan tarifon.

\*\*\*\*\*



36 15 ESPERANTO  
 CIO, PRI LA GRAVA AVENTURO DE LA KOMUNIKADO

# ABONLISTO DE LA LIBROSERVO DE UEA Abonkotizoj en guldenoj! (1guldeno=3FF)

Ateismo [ATEO]	16,00
Boletín [hispana]	27,00
Brita esperantisto, La	34,00
aerpoŝta aldono	7,00
Bulgara esperantisto	32,00
Dia regno [KELI]	21,00
Ekonomia bulteno pri Usono	22,00
El Popola Ĉinio	
1 jaro	35,50
2 jaroj	61,00
3 jaroj	85,00
Enigma (spritaj ludoj)	33,00
Esperanta mormonaro [PEM]	20,00
Esperantista vegetarano [TEVA]	12,00
Esperanto, L' [itala]	23,00
Espero el Koreujo, La	24,00
Espero katolika [IKUE]	42,00
Espero, La [sveda]	33,00
Evangeliaj kajeroj	24,00
Fenomeno [nederlanda]	30,00
Fonto (literatura)	30,00
Franca esperantisto	50,00
Gazeto, La (mondkultura)	46,00
aerpoŝta aldono	8,00

Heroldo de Esperanto	43,00
aerpoŝta aldono:	
Eŭropo	7,00
Itlis-Forumo	
(literatura/interlingvista)	29,00
Internacia Celado por	
Eduko Moderna per Esperanto	
(Freinet-metodo)	27,00
Internacia pedagogia revuo	
[ILEI]	13,00
Jaro, La (supl. Monato)	8,00
aerpoŝta aldono	2,00
Jugoslavia stelo	20,00
Juna amiko (por lernejoj)	10,00
Kancerkliniko, La (ajnista)	37,00
Koko (jugoslava literaturo)	20,00
Koncize (okc.-eŭropa junularo)	12,00
Kulturaj kajeroj	
(kastelo Grésillon)	25,00
Kvakeria esperantisto [KES]	15,00
Language Problems and	
Language Planning	
individuaj abonoj	54,00
instituciaj abonoj	105,00

Letero de la Akademio	
de Esperanto, La	40,00
Literatura foiro	58,50
aerpoŝta aldono	18,00
Medicina internacia revuo	30,00
Monato (aktualaĵoj)	62,00
aerpoŝta aldono	15,00
Norvega esperantisto	18,00
Oomoto [EPA]	18,00
Perspektivo [ĉeĥoslovaka]	18,00
Sano (ĉeĥa medicina)	10,50
Scienca revuo [ISAE]	27,00
Sennacieca revuo [SAT]	13,00
Sennaciulo [SAT]	52,50
Simpozio [filozofio: FAT]	11,00
Svisa Esperanto-revuo	40,00
TEJO-tutmonde	15,00
Tutmondaj scienco kaj tekniko	
1 jaro	14,00
2 jaroj	25,00
3 jaroj	36,00

## Nekompleta... KALENDARO 1991 (7-11 II:Expolangues) POR LA JARO



	JANUARO	FEBRUARO	MARTO
LUNDO	7 14 21 28	4 11 18 25	4 11 18 25
MARDO	1 8 15 22 29	5 12 19 26	5 12 19 26
MERKREDO	2 9 16 23 30	6 13 20 27	6 13 20 27
ĴAŬDO	3 10 17 24 31	7 14 21 28	7 14 21 28
VENDREDO	4 11 18 25	1 8 15 22	1 8 15 22 29
SABATO	5 12 19 26	2 9 16 23	2 9 16 23 30
DIMANĈO	6 13 20 27	3 10 17 24	3 10 17 24 31
	APRILIO	MAJO	JUNIO
LUNDO	1 8 15 22 29	6 13 20 27	3 10 17 24
MARDO	2 9 16 23 30	7 14 21 28	4 11 18 25
MERKREDO	3 10 17 24	1 8 15 22 29	5 12 19 26
ĴAŬDO	4 11 18 25	2 9 16 23 30	6 13 20 27
VENDREDO	5 12 19 26	3 10 17 24 31	7 14 21 28
SABATO	6 13 20 27	4 11 18 25	1 8 15 22 29
DIMANĈO	7 14 21 28	5 12 19 26	2 9 16 23 30
	JULIO	AŬGUSTO	SEPTEMBRO
LUNDO	1 8 15 22 29	5 12 19 26	2 9 16 23 30
MARDO	2 9 16 23 30	6 13 20 27	3 10 17 24 31
MERKREDO	3 10 17 24 31	7 14 21 28	4 11 18 25
ĴAŬDO	4 11 18 25	1 8 15 22 29	5 12 19 26
VENDREDO	5 12 19 26	2 9 16 23 30	6 13 20 27
SABATO	6 13 20 27	3 10 17 24 31	7 14 21 28
DIMANĈO	7 14 21 28	4 11 18 25	1 8 15 22 29
	OKTOBRO	NOVEMBRO	DECEMBRO
LUNDO	7 14 21 28	4 11 18 25	2 9 16 23 30
MARDO	1 8 15 22 29	5 12 19 26	3 10 17 24 31
MERKREDO	2 9 16 23 30	6 13 20 27	4 11 18 25
ĴAŬDO	3 10 17 24 31	7 14 21 28	5 12 19 26
VENDREDO	4 11 18 25	1 8 15 22 29	6 13 20 27
SABATO	5 12 19 26	2 9 16 23 30	7 14 21 28
DIMANĈO	6 13 20 27	3 10 17 24	1 8 15 22 29

La grupo "KAJTO" vizitos nian regionon.

FEDERACIA KONGRESO en ARLES (kun Provenca Fed)

26-30 IV: Nacia Kongreso en Boulogne sur Mer.

20-26 VII: TEJO-kongreso en Karlskoga (S)

27 VII-3 VIII: U.K. Kongreso de Bergen (N)

Aligu al la Fed. Kongreso k. sendu viajn informojn por SFS antaŭ tiu dato!

8-12 V: Staĝo en Béziers vidu p.

18-20 V: Gejunuloj en Mondhejmo?

24-31 VIII: Internacia Semajno de Habère-Poche

7-14 IX: Int. Semajno en SETE

**Alvoko**

**Anoncoj**

Ni jam havas 340 perkorespondajn lernantojn en diversaj landoj el Afriko. Ni povus ankoraŭ multe plialtigi tiun nombron sed ni bezonas financon helpon. Pro tio ni kolektas kaj vendas poŝt-markojn; ĈU VI VOLAS HELPI NIN? Sendu al ESPERANTO-KURSO BP 7073 F-34080 MONTPELLIER FRANCIO ĉiujn ajn P. M novajn aŭ stampitajn kiujn vi trevos. ANTAŬDANKOJN DE NIA AFRIKA SERVO.

GAE (Groupe d'Action pour l'Espéranto) - 123, Rue de Royan 16710 Saint Yrieix reeldonis la broŝuron "Nos premiers pas en Esperanto". Nova aspekto. Prezo: 10F + sendkosto (1 broŝuro pezas 100 gramojn). GAE ankaŭ proponas la broŝuron "L'espéranto, un facteur de l'avenir européen" de Profesoro Filleul. Prezo: 5F + sendkosto (1 broŝuro=50 gramoj) En ambaŭ kazoj 10% rabato se vi mendas pli ol 10 broŝurojn.

La Gruio Argentada B.P.5 33790 Pellegrue (apud St Emilion en la Bordoza regiono) proponas al vi kelkajn el "la plej bongustaj" vinoj, ĉu blankajn, ĉu ruĝajn, ĉu dolĉajn, ĉu nedolĉajn. La vinoj estas enboteligitaj en la kastelo mem kaj ĉiu botelo portas Esperanto-etikedon, tiel diskonigante la internacian lingvon tra la tuta mondo.

# FEDERACIA KONGRESO

Jes ja, nia venonta federacia kongreso gravos, pro tio ke ĝi okazos kun tiu de la Provenca federacio. Notu la daton, la 13an kaj 14an de Aprilo 1991 kaj la lokon **ARLES**. Pri la urbo de nia venonta kongreso ne necesas detale raportoj, ĝi famas pro sia beleco kaj plie estas facile atingebla.

Jam la 10an de Novembro renkontiĝis delegacioj de la federacioj en la MJC de Arles. Reprezentis nian federacion: Ges. Cayzac, A. Gausson, C. Gérard, J. Hénin, L. Négron kaj R. LLech-Walter. Reprezentis la Provencan federacion: André Loisel (Prezidanto), Marie Hunninck (Vic-Pr.), André Brest (sekretario), Denise Loisel (kasistino), Janine Couderc kaj Robert Rieux (Avignon), Ges. Blary, Jean Gauthier kaj Paul Girod (Arles), Andrée Girardin (La Roque) kaj Georges Bourdet. Foto aperis en "Provence Esperanto".

Kompreneble ni faris kelkajn decidojn, pro tio la apuda programo. Restas la ĉefa decido, kiu estos la via : partopreni. Ni kalkulas kun cento da partoprenantoj, do ne hezitu aliĝi kaj sufiĉe frue por ne ĝeni la organizantojn. Ankaŭ ne hezitu peti novulojn akompani vin. Ni kongresos en la "Domo por junularo" en la urbo-centro, kiu disponas pri belaj salonoj kaj kies direktoro estas la sindonema J. Gauthier (inter aliaj, li respondecas pri "Provence E°"). Parenteze J. Gauthier estis unuanime elektita prezidanto de la LKK (loka kongresa komitato), Gustave Blary (UEA delegito de Arles) la sekretario kaj Paul Girod la kasisto. Por ke gejunuloj povu veni kaj finance elteni, J. Gauthier konsentas, ke ili manĝu en la MJC (la alportitajn manĝaĵojn) kaj eĉ dormu (en alportitaj dormsakoĵ). Dankon pro lia komprenemo. Ankaŭ estas eblecoj en la junulgastejo (eĉ por plenkreskuloj), pri hoteloj vidu ĉi-malsupre. Pri manĝoj ni trovis malmultekostan solvon sed necesas antaŭmendi! Pri la programo fine. Ĝi ne estas definitiva kaj dependas de vi : faru proponojn... Gis baldaŭ en Arles!

J.H.

*Esperable niaj federacianoj ne atendas la lastan tagon por aliĝi... Same, ĉar ni deziras sendi al vi la lastajn informojn kaj urbpplanon de Arles en la venonta bulteno, ĝi nepre devos aperi komence de Aprilo kaj ne atendas la kutimajn malfruajn informantojn. Sendu viajn informojn pri Aprilo, Majo, Junio antaŭ la fino de Marto. Anticipan dankon!*

## LOGEBLECOJ

Ne mankas hoteloj en ARLES, vi povos ricevi la liston de ĉiuj hoteloj, petante ĝin ĉe "OFFICE DE TOURISME" 13200 ARLES.

Sed ni indikas al vi, ĉi-sube, 4 hotelojn proksimajn de la Kongresejo, ili estas el la 2-stela kategorio.

Les voitures ayant visiblement la marque "ESPERANTO" au pare-brise ou à la lunette arrière pourront stationner gratuitement autour de la Maison des Jeunes. Sinon un parking payant se trouve à proximité.

- T. 90.96.04.05 -Hotel CONSTANTIN - 34 Bld Craponne - 115/220f (parking privé)
- T. 90.96.00.63 -Hotel GALLIA -rue de l'H. de Ville à partir de 100/120f
- T. 90.96.76.15 -Hotel LOU GARDIAN . 70 rue du 4 Septembre 150/220f
- T. 90.96.88.38 -Hotel ST TROPHIME - 16 rue de la Calade 125/220f

**1991**  
en la kastelo Grésillon



## Kulturaj aranĝoj:

- 27/4-4/5: Internacia renkonto de infanoj
- 17/6-30/6 Internacia amika renkonto
- 1/7-8/7 : Seminario por Cseh-instruado
- 9/7-22/7 Prelegoj kaj kursoj
- 23/7-5/8: La arto traduki
- 6/8-19/8: Lernu kaj praktiku
- 20/8-2/9: Somerfina lernejo

Informoj ĉe: E°-domo Gresillon 49150 BAUGE

FEDERACIO D'ESPERANTO de LANGVEDOKO  
 kaj RUSIJONO  
 FEDERACIO D'ESPERANTO de PROVENCO  
 KUNA FEDERACIA KONGRESO

13an - 14an de APRILO 1991 en la Domo de la Junuloj-Bulvardo des Lices  
 13200 ARLES

-----

-PROGRAMO-

Sabate 13an 9a Ekzamenoj -tri-gradaj-  
 12a30 Komuna tagmanĝo en Junul-Gastejo  
 15a Aparta Ĝenerala Kunveno de ĉiu Federacio  
 19a Vespermanĝo en Junul-gastejo  
 20a30 Distra vespero

Dimanĉe 14an 9a30 Komuna Amika Kunveno de la du Federacioj  
 12a Komuna aperitivo sekvata de tagmanĝo  
 en Junul-Gastejo  
 14a30 Gvidata, senpaga, pieda vizito de la urbo  
 Post la vizito, fino de la kongreso.

-----

ALIĜILO - RESENDU ĜIN ANTAŬ LA  
 30a. de MARTO 1991

NOMO, antaŭnomo kaj adreso : \_\_\_\_\_

ALIĜO :: 40f por unu persono.....: \_\_\_\_\_  
 senpaga por studentoj kaj eksterlandanoj.

LOĜADO : Mi mem rezervos ĉambron en hotelo (vidu dorso)  
 Ekzistas Junul-Gastejo, Avenuo Mal FOCH  
 Tel. 90.96.18.25

MANĜOJ : Mi manĝos ĉe la Junul-Gastejo, (ĉiu manĝo 45f)  
 sabate tagmeze\*-vespere\*-dimanĉe tagmeze\* 45x...: \_\_\_\_\_

VIZITO : Mi intencas viziti la urbon JES\* NE\* \_\_\_\_\_  
 SUME : \_\_\_\_\_  
 -----

Mi kandidatiĝas al : Atesto pri lernado\*-Praktika lernado\*-Kapableco\*  
 Mi kandidatiĝas al Komitato de Provenca Federacio JES\* NE\*  
 Mi kandidatiĝas al Komitato de Langvedoka/Rusiljona Federacio JES\* NE\*  
 \* Forstreku la ne utilajn menciojn

SENDU vian aliĝilon kun ĉeko nome de ESPERANTO

al Maison des Jeunes  
 Boulevard des Lices  
 13200 ARLES

ANTAŬ la 30a  
de MARTO 1991

## BEZIERS

6

**KUNVENOJ** : Sabaton, la 12an de Januaro : Trireĝa kuko. Lumbildoj.  
Dimanĉon, la 3an de Februaro: F-ino Roques parolos pri krozado  
sur Mediteraneo  
Sabaton, la 2an de Marto: Paroladeto de J-P. Peray.  
Gustumado de krespoj.  
Ciuj kunvenoj okazos je 14h30 en Caserne St Jacques.

## STAĜO

Ni klopodas starigi staĝon en Béziers mem, en la kastelo de Devèze, dum la semajno de Cieliro (de la 8a ĝis la 12a de Majo).  
La grupo **NEPRE** devas enteni almenaŭ 15 homojn; tio estas postulo de la direktorino de tiu "domo". Do rapide konigu vian partoprenon, por ke ni povu aŭ konfirmi aŭ rezigni pri la rezervigo de la kastelo kaj la staĝo.  
La prezo por la tuta restado estos ĉirkaŭ 600F (la prezo por 1991 ĝis nun ne estas taksita de la kastelestraro) plus kotizo de 100F ĝis la fino de Marto, 150F poste, ĉar la uzo de la kastelo ne estas senpaga.  
Por konfirmi vian partoprenon, bonvolu sendi antaŭpagon por unu tago (150F) al Fédération Espéranto de l'Hérault pĉk/ccp 1689.89 E Montpellier aŭ, se vi uzas bankĉekon, je la profito de Féd. Esp. de l'Hérault kaj sendu ĝin al:  
Cercle Biterrois d'Espéranto 9, Rue Georges Picot 34500 Béziers.  
Kompletaj aliĝiloj kun pliaj informoj alvenos poste.

\*\*\*\*\*

*Ni dankas la grupon de Béziers, kiu bonvolas denove prizorgi la printempan staĝon. Ni esperas, ke la aranĝo ricevos bonan subtenon de la federacianoj. Venu al Béziers dum longa semajn-fino por perfektigi en la lingvo kaj pasigi momenton en amika etoso. Kursoj kun pluraj niveloj (komencantoj, progresantoj...) estas antaŭviditaj. Ne forgesu, ke minimuma nombro da partoprenantoj estas postulata. La daŭrigo de la printempa staĝo ankaŭ dependas de VI ! Ĝis !*

\*\*\*\*\*

Le groupe de Béziers vous propose un stage d'espéranto à l'Ascension (8 au 12 Mai). Il se déroulera à Béziers même, au Château de la Devèze. Plusieurs niveaux sont prévus : initiation, approfondissement, perfectionnement). Ambiance studieuse et amicale assurée. Pour le séjour complet, prévoir environ 600F + adhésion de 100F (150F après Pâques). Pour une inscription ou une demande de renseignements s'adresser au CBE (adresse ci-dessus).

*P.S.: Le stage commencera le mercredi à partir de 16 h et se terminera le dimanche après-midi après le repas; il durera donc 4 jours pleins, le temps nécessaire pour les courageux de faire des progrès!*

\*\*\*\*\*

Dudeko da personoj festis la Zamenhofan tagon en Decembro. Post la komuna tagmanĝo, distra parto kun ludo aŭ deklamado de S. Authier, A. Roques, F. Terral kaj J-P. Peray. Ankaŭ ludis junulinoj el La Canourgue. Amika etoso.

\*\*\*\*\*

## NARBONNE

Ŝajne E° renaskiĝas en tiu urbo. Kurso funkcias ĉiusemajne kun S-ino Jaloux (krom eraro je mardo posttagmeze). Estas nun preparolata la ebleco de kurso iun vesperon, eble kun la helpo de S-ro Luttermann.

\*\*\*\*\*

## PERPIGNAN

Radio-France Roussillon alvokis S-ron René Llech-Walter por intervjuo pri esperanto. La Prezidanto de la Kultura Centro partoprenis la elsendon kun S-ino Anna Csupor (Rumani-no) kaj dum unu horo ili parolis pri nia movado, la praktika uzado de E° kaj respondis al diversaj demandoj.  
Kursoj de E° malfermiĝis dum Novembro, sep lernantoj sekvas la mardan kurson en la Centro kaj tri la sabatan kurson. La Kataluna Centro ankaŭ malfermis kurson de E° ĉiumerkrede.  
*Ni povas ĝoji, ke estas tiom da novaj gelernantoj en Perpignan. La "Kultura Centro" partoprenis la forumon de la asocioj komence de Decembro. Substrekinde, ke deĵoris sinsekve la anoj, ĉu malnovaj, ĉu novaj, de la "Centro". Imitinda ekzemplo!*

\*\*\*\*\*

# MONTPELLIER

7

"Kajto" estos en Laroque d'Olmes (09) la 3an de Aprilo 91.

Ne atingis SFS informoj pri la venontaj kunvenoj de la grupo. La grupo "Kajto", kiun ni menciis en nia lasta numero, venos al Montpellier komence de Aprilo (loko kaj dato konfirmotaj en la venonta SFS).

"40 paŝetoj al plua lernado"...elĉerpiĝis (nia libroservo federacia disponas pri stoketo)... sed Kribo reeldonis ĝin 500ekzemplere. Kiu mendos samtempe 15 ekzemplerojn (aŭ pli), ricevos senpagan kasedon kun registrado de la tekstoj. Prezo de "40 paŝetoj":10F.

Gratulojn al L.Lentaigne kaj C. Cayzac pro tiu sukcesa eldono.

Reĝustigo : En nia lasta N°, temis pri Hanna Cayzac (ne pri Anna) kaj pri la "Internacia Semajno" de Sète, ne de Agde! Pardonon pro la eraroj!

\*\*\*\*\*

## 15a kaj 16a INTERNACIAJ SEMAJNOJ DE ESPERANTO...

Pro niaj pasintjaraj sukcesoj, ni organizos<sup>en</sup> venonta somero

### DU INTERNACIAJN SEMAJNOJN.

- La unua okazos en vilaĝeto de franca montaro Alpes, 1000m super marnivelo, 30km sudoriente de Genevo, en mirinda ripozilo, kadre de bela feriejo, de la 24a ĝis la 31a de aŭgusto 1991.

- La dua okazos ĉe mediteranea marbordo, en havenurbo SETE, 30Km okcidente de Montpellier, en bela parko apud la maro., de la 7a ĝis la 14a de septembro 1991.

Ni proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esperanto.

Ni havos tri nivelajn kursojn zorgitajn de eminentaj instruistoj inter kiuj S-roj Moirane kaj Babin kaj S-ino C. de Lorenzi

Vi povas kapti okazon ferii tri semajnojn en Francio; la dua semajno estos libera: tiel vi povos vojaĝi tra Francio kaj viziti viajn korespondantojn aŭ, laŭ prefero, vi povos plurestadi en la montara feriejo.

Kiel ĉiujare vi trovos vere internacian etoson. Ankaŭ... banado, ekskursoj, belaj vesperkunvenoj kaj bona manĝo ĝojigos vin;

Tre modesta restadokosto Ambaŭ domoj taŭgas por rulseĝoj. Ebleco tendumi proksime. Aligo/Informo: ESPERANTO, 5 rue du Docteur Roux, 34000 MONTPELLIER - FRANCE

# NIMES



## LA KROKODILO

de nimes

n° 2/90

Membro de Nord-Okcidenta Mediteranea Asocio en TUTMONDA AMIKARO : de Hispanio ĝis Italio, ĉiuj samideanoj aŭ grupoj sendu al ni informojn pri iu kunveno aŭ vojaĝo, kiu povus interesi tiun regionon, kaj ni sciigos tuj ilin. Tio nur permesos interŝanĝojn tra ESPERANTUJO.

\*\*\*\*\*

CENTRE CULTUREL ESPERANTISTE de NIMES kaj FEDERACIO ESPERANTO F30

✉ ESPERANTO 3, Rue de Combret F-30900 NIMES ☎ 66/64/03/22

\*\*\*\*\*

▷ RADIOELSENDO: Radio Tip 105,8 ĉiun <sup>unuan</sup> sabaton 10.00 - 10.30

\*\*\*\*\*

Alia N° de "La Krokodilo" aperis kun foto de L.L. Zamenhof (en I875). Se, kiel P. Touron, vi ne ŝatas la tradician portreton de tiu kalva barbulo kun okulvitroj... jen alia ebleco!

50 personoj ĉeestis la prelegon de P. Janton je la 8a de Decembro, inter kiuj 20 ne-esperantistoj. Vendiĝis 10 libretoj (Puf/Que sais-je?).. Duono de la ĉeestantaro kune vespermanĝis.

\*\*\*\*\*

## Au cercle espéranto

Le cercle culturel nîmois pour l'Espéranto se réunit tous les mercredis à Pablo Neruda, grande salle du deuxième étage de 15 h 30 à 18 h 30. Toutes les personnes qui veulent se familiariser avec la langue internationale et rapidement en apprendre les principes sont amicalement invitées à participer aux rencontres: conversation en espéranto, jeux et réception des visiteurs étrangers. L'initiation à l'espéranto est gratuite. Si ces horaires ne vous conviennent pas, écrivez au siège social: Espéranto, 3, rue de Combret, 30900 Nîmes ou téléphonez au 66.64.03.22 pour vous renseigner!

## HISTORIA SKIZO PRI LA ESPERANTA MOVADO EN DEPARTEMENTO GARD (3a parto)

En 1971 ni ĝemeligis la jaran konferencon de la Esperantistaj Fervojistoj kun la Federacia kongreso de Langvedoko-Rusiljono. Pli ol cent partoprenantoj. Ĝi daŭris 2 tagojn. Ni vizitis la "mine-image" en Rochebelle, kaj la cent partoprenantoj sin retrovis por komuna tagmanĝo en St Jean du Gard.

Dum la daŭro de la vivo de la grupo ni akceptis eksterlandanojn:

F-ino Zazuko, japanino

S-ro Tyblewski, pola profesoro

S-ro Captein, nederlandano, kaj la lasta en 1970 (?) estis japanino

Kimie Osawa, kiu prezentis la japanan kalkulilon "Bako". Tial ke la lokaj aŭtoritatoj (urbestraro, komerca ĉambro) pretekstante, ke ne estas komerca afero, rifuzis al ni ĉambron por la prelego, tiu-ĉi tamen okazis en la teknika kolegio, kie deko da studentoj de la min-lernejo konkursis kun Kimie, sed ne sukcesis kalkuli tiel rapide kiel ŝi.

En 1968 ni kreis "departementan federacion", kreis cirkulantan bibliotekon (Pelletier fabrikis la kofrojn), kaj ni organizis "Esperanto-tagojn" en diversaj urboj de la departemento: Bagnols sur Cèze, La Roque sur Cèze, Sommières, Uzès, La Grand-Combe, St Christol lès Alès, Aubais, ktp. Pro sia sano S-ro Raynaud iom bremsis sian aktivecon. En 1982 li forlasis Aleson por loĝi en Nimo, kaj lasis al S-roj Pelletier kaj Bolla la gvidadon de la grupo.

## TRIA PERIODO EN NIMO

Ĝi estis iniciatita kaj daŭre animita de la geedza paro Volpelière. Post la triumfa paso de Gary Davis, tiuj du samideanoj intime kunligis en sia aktiveco du celojn, kiujn ili rigardis kiel nedisigeblajn, nome mondcivitaneco kaj lingvo internacia. Ĉiujare per propra metodo Renata Volpelière instruadis plurajn lernantojn, kaj tiel formiĝis grupeto, kiun ili ĉiusemajne akceptis en sia hejmo. Poste la grupo, preninte la nomon "Cercle culturel espérantiste", kunvenis en ĉambro de la Kulturcentro Pablo-Neruda, komence ĉiusemajne, poste ĉiumonate.

Ge-Volpelière ankaŭ invitis kaj ofte gastigis eksterlandajn esperantistojn: japanajn, bulgarajn, italajn, anglajn, kies ĉeesto kaj intervenoj animis niajn kunvenojn.

Baldaŭ ili ricevis tre efikan helpon de D-ro Salan, subite reveninta al la movado, sed ne plu politike agitanta. Li dediĉis sian pedagogian talenton al neformala perfektiga kurso, per kiu pluraj lernantinoj, kune kun vizitoj en kongresoj aŭ en praktikaj staĝoj en Grésillon, akiris bonan kapablecon. Bedaŭrinde tiu kurso ĉesiĝis pro la subita morto de la profesoro.

En la lasta jardeko la morto frapis en niaj vicoj. La funebra listo komenciĝas kaj finiĝas per la nomo Volpelière; Roĝero malaperis en junio 1980, Renata en decembro 1986. Intertempe forpasis en februaro 81 Georges Salan, en 83 nia tiama prezidanto Hubert Janez kaj nia malnova amiko Gilbert Puechagut. Malgraŭ tiuj gravaj perdoj la impulso estis donita, kaj la movado pluiras sian vojon, ricevante freŝajn fortojn, kiuj permesas bonan esperon por la estonteco.

En la lasta jardeko ni plurfoje aŭdis tre interesajn prelegojn de Profesoroj Duc Goninaz kaj Janton. Dum pluraj jaroj SFS estis eldonita en Nimo, dank'al la kompetento kaj sindonemo de Roberto Frus, presisto-kompostisto veninta de Torino, kaj nun realmigrinta al sia naskiĝa urbo.

Nia departemento ankoraŭ akceptis tri federaciajn kongresojn:

Nimo 1985, kun persona ĉeesto de la urbestro

Vauvert 1986

Aleso 1990, kun saluto de la urbestro.

Eble Nimo gastigos en 1993 la nacian kongreson...

FINO

NDLR: Skizo ne povas esti detala; pro tio multaj eventoj en la historio de la movado en 30 restis en la ombro. Tamen J. Amouroux, nia historiisto, sendis al R. Laval kelkajn korektojn kaj precizigojn, kiujn ni volonte aldonas:

Dua periodo: La 18an de Majo 1930, D-ro Salan inaŭguris en Nimo esperantistan kolĉozon "Fajrero".

En 1933 eldoniĝis en Nimo, FEP ĉe Laborborso, 14 Rue Pavée, ĉiuj presitaj:

- Cours élémentaire d'espéranto

- 52paĝa franclingva broŝuro: "L'Espéranto au service du Proletariat".

- Nouveau cours rationnel et complet d'espéranto, rebakaĵo kun bolŝevista tendenco de la "Cours Rationnel" de FEO aperinta en 1931.

Aperis ankaŭ (multobligite):

- Corrigé des exercices (du "Nouveau cours rationnel....")

- Rekta kurso de esperanto (por laboristaj instruantoj).

Aperis ankaŭ, presite, la ilustrita ĉiumonata "Proleta Esperantisto" (gérant: Dro Salan), kies lasta n° 37 en posedo de J. Amouroux, aperis en decembro 1935.



9

Tria periodo: En somero 1948 okazis ne la unua postmilita kongreso de UEA en Nederlando, sed la 21a kongreso de SAT en Amsterdamo, kiun partoprenis Ges. Volpelière. Tiu epoko la Nima E<sup>o</sup>-grupo daŭre sidejis ĉe la Laborborso. Dro Salan, kvankam li jam kabeis, kiel ni diris, tamen pagis sian kotizon. La unua postmilita U.K. (la 32a) okazis en Berno en 1947. La dua federacia kongreso en Aleso okazis ne en 1958, sed la 23an de Majo 1954 (en ĝi partoprenis J. Amouroux).

Dankon al J.A. kaj R.L. pro la informoj.

